# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

**N° 214 OKTOBRO 2002**

La numero : 2 euroj Abono: 7 € Kotizo: 3 € Sume: 10 €

TRIMONATA BULTENO de FRANCA ĶATOLIKA ESPERANTO ASOCIO
(Filio de I.K.U.E. = Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista)
BULLETIN TRIMESTRIEL DE L'ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE
POUR L'ESPERANTO

*** *Sankta* PIO X-*a, preĝu por ni* ***

Imp. MOSER - 68127 NIEDERHERGHEIM




## RENCONTRE EUROPEENNE

# Sommaire/*Enhavo*


| | Pages/*Paĝoj* |
|---|---|
| Le mot du président-*La bileto de la prezidanto* | 3 |
| Prières - *Preĝoj* | 5 |
| *En nia Asocio* | 6 |
| Statuoj de nia socio | 7 |
| Kalendaro | 11 |
| Avo Frosto | 13 |
| En memoro al Cyril Vrbik | 14 |


**ESPERANTO : INTERNACIA LINGVO**


Expéditeur/: Ass. Cath. Française pour l'espéranto
*Sendinto* 9, rue Paul Doumer
F- 68920 WINTZENHEIM-COLMAR


**Motif de non distribution**

- ☐ Adresse insuffisante
- ☐ N'habite pas à l'adresse
- ☐ Refusé
- ☐ Autres

Périodique Semi-routé

**PORT PAYE**

COLMAR (68)

## Surkovrile

Ĉi-jare la Eùropa Junulara Renkontiĝo de TAIZE okazos en Parizo (kiel en 1978,1983,1988 kaj 1994 ).
Lastjare ĝi okazis en Budapest .



L'esperanto. Face aux problèmes linguistiques, une langue neutre vraiment internationale pour les contacts directs d'homme à homme.

Ĉiujn artikolojn oni rajtas reprodukti kondiĉe ke estu citata la fonto.Specimenon kun represo aù tradukado oni sendu al la redaktoro.

La materialon por la bulteno oni sendu al la redakcio nepre antaù la 28.a de decembro 2002. Venonta bulteno aperos fine de decembro.

Finpresado la 10/11/2002


*FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO*

**Nro 214 Oktobro 2002**

Trimonata eldonaĵo de Franca Katolika Esperanto Asocio (Association Catholique Française d'Esperanto A.C.F.E )
CCP : 2 324 93 N Rouen



Prezidanto:
S-ro A. BESSIERE
28,Rue C.St-Saëns
76000 ROUEN

Sekretario:
F-ino A.M CHANEY
56,Rue Corvisart
75013 PARIS

Kasisto :
S-ro G.VILLENEUVE
14,Rue Clair de Lune
91530 SAINT-CHERON

Religia Konsilanto :
P-ro HEROUX
Maison St-Joseph
26400 ALLEX

Peranto IKUE:
S-ro PONS Roger
Rue du 8 Mai 1945
87510 NIEUL

Redakcio :
Fam.BASSO-RESCIO
9,Rue Paul Doumer
68920 WINTZENHEIM
Fakse 0389794333
Rete 100623.3022@Compuserve.com


# Le mot du Président

Derrière les nuages se cachent mille soleils affirme un proverbe hindou.

Or dans notre vie nous connaissons tous, un jour ou l'autre, des périodes d'obscurité ou simplement de pénombre dues aux soucis, aux difficultés de toute sorte, voire au péché. Ne cédons pas au découragement, car derrière les heures sombres il y a toujours la petite lueur de l'espérance, soleil de nos vies. C'est une vertu que nous ignorons trop souvent et pourtant elle conditionne toutes les autres.

Mais me direz vous, tout va mal. La société encourage l'égoïsme, l'hédonisme, court après le bonheur que l'on identifie à tort avec le plaisir et se désintéresse sans scrupules du sort des autres. C'est exact, mais nous ne devons pas nous arrêter devant le rideau de nuages qui masque le soleil. Ces difficultés sont de toujours; St-Paul les énumérait (Rom.8,35-39) pour proclamer que, quoi qu'il arrive, nous sommes finalement vainqueurs, grâce à Celui qui nous a aimés.

Alors ne courbons pas la tête devant l'orage et les obstacles. Faisons face aux difficultés et sachons voir, derrière le nuage noir du désespoir, le soleil que nous aspirons à contempler, pour que, revigorés par sa chaleur et sa puissance, nous sachions aller de l'avant et être forts d'une Foi, ancrée sur l'espérance, qui donne force et courage.

C'est le souhait que je forme pour nous tous en cet automne, où redémarrent nos activités. Notre association a besoin de votre persévérance dans l'idéal d'humanisme qui anime chaque espérantiste et qui se nourrit, en ce qui nous concerne plus spécifiquement, de la Foi qui nous anime et nous fortifie.

Quoi qu'il en soit des apparences trompeuses de notre monde en crise , l'avenir ne cesse d'être aussi radieux que les rayons lumineux du soleil.

# La bileto de la prezidanto

Malantaù la nuboj sin kaŝas mil sunoj asertas hinda proverbo.

Tial, iutage ni ĉiuj konas en nia vivo periodojn de mallumo aù simple de duonlumo pro la zorgoj, la ĉiuspecaj malfacilaĵoj, eĉ la peko. Ni ne cedu al la senkuraĝigo, ĉar malantaù la mallumaj horoj ĉiam staras la eta lumeto de la espero, suno de niaj vivoj. Tio estas virto, kiun ni tro ofte ignoras sed tamen ĝi estas kondiĉo por la aliaj virtoj.

Sed vi rebatos, ĉio iras malbone. La societo favorigas la egoismon, la hedonismon, postkuras la feliĉon, malprave identigita kun la plezuro kaj senkrupule neglektas alies sorton. Tute prave ! sed ne estas inde halti antaù la nubokurteno, kiu kaŝas la sunon. Tiaj malfacilaĵoj ĉiam ekzistis; S-ta Paùlo detaligis ilin (Rom. 8,35-39) por proklami, ke, kio ajn okazas, ni finfine estas venkantoj, dank'al Tiu, kiu amis nin.

Tiam, ne klinu la kapon antaù la fulmotondro kaj la obstaklo. Ne frontu la malfacilaĵojn kaj ni klopodu vidi, malantaù la nigra nubo de la malespero, la sunon, al kiu ni sospire rigardas, por ke, reviviglitaj per ĝia varmo kaj ĝia povo, ni klopodu antaùeniri kaj esti fortaj de Fido, firme ankrita en la espero; tiu ĉi donas al ni forton kaj kuraĝon.


Tio estas la bondeziro, kiun mi deziras al vi ĉiuj en tiu , aùtumno, kie rekomencas niaj aktivaĵoj. Nia asocio bezonas vian persistemon en la humanisma idealo, kiu vigligas ĉiun esperantiston kaj nutriĝas, pli prezice por ni, de la Fido puŝanta kaj fortiganta nin.

Kio ajn estas la erarigaj eksteraĵoj de nia deprimita mondo, la estonteco neniam ĉesas esti tiel radia, kiel la lumaj sunradioj.

# DIO RIGARDAS VIN

Dio rigardas vin tutpersone,
Kia vi estas,
Li vokas vin per via nomo,
Li vidas vin, Li komprenas vin,
Ĉar Li faris vin.
Li scias, kio staras en vi,
Viajn pensojn kaj viajn proprajn sentojn,
Viajn inklinojn, viajn gustojn, vian forton kaj vian
malforton.
Li vidas vin en viaj ĝojaj kaj malĝojaj tagoj.
Li legas sur via vizaĝo la rideton aù la larmojn,
La sanon aù la malviglecon.
Li korinkline rigardas viajn manojn kaj piedojn.
Li aùskultas vian voĉon, vian korbatojn, vian spirblovon.
Vi ne povas ami Lin pli bone ol Li amas vin.

Kardinalo John Henry Newman
(1801-1890)



# EN NIA ASOCIO

Novaj membroj

S-ino DUROU Solange (Pyrénées Atlantiques)
Anonima S-ino (Bas-Rhin)

Bonvenon al la genovuloj

Donacis monon :
S-ro CORNUT
F-ino GOUDE
S-to MELIGNON
S-ino KLEIN

Dankegon al ili pro ilia grava helpo al nia asocio

LA ESPERANTO-REDAKCIO de RADIO-VATIKANA atingis sian 25an jubileon .
Porokaze oni invitas sendi dank-leteron kaj gratulon pro la atingita jubileo al la:
Segreteria di Stato
SCV-00120 CITTA DEL VATIKANO.

informoj ĉe:
www.vaticanradio.org/esperanto/proesperanto.htm

En la sekvantaj paĝoj vi povas legi niajn novajn statutojn.

# Statuts de A.C.F.E

## TITRE I - BUT et COMPOSITION

**Art: 1** L'association catholique française pour l'Esperanto, fondée à Paris en 1910, est déclarée conformément à la loi du 1er juillet 1901 sur les associations . Son but est :
1°/ de grouper les catholiques s'interessant à l'Espéranto. 2°/ de propager l'Espéranto dans les millieux catholiques.

**Art 2** Son siège social est : 56, Rue Corvisart PARIS 13ème et peut être transféré par décision du Comité Directeur.

**Art 3** Les moyens d'action de l'Association sont : 1°/ Réunions, conférences, congrès, 2°/ Publications, 3°/ Tous autres moyens tendant au développement de l'association et à la réalisation de son programme d'action .

**Art 4** L'association se compose de :
- Membres d'honneur, nommés pour leurs services rendus, par l'Assemblée Générale et sur proposition du Comité Directeur.
- Membres bienfaiteurs, payant une cotisation égale à cinq fois celle des membres actifs,
-Membres actifs, qui paient une cotisation fixée chaque année par le Comité Directeur,
-Membres approbateurs, qui paient la même cotisation que les membres actifs, mais ne participent pas à la vie de l'association.

**Art 5** La qualité de membre se perd : a) par démission, b) par radiation prononcée par le Comité Directeur pour motif grave, c) par non-paiement de la cotisation .

## TITRE II ADMINISTRATION ET FONCTIONNEMENT

**Art 6** L'association est administrée par un Comité Directeur, composé de 10 à 15 membres élus pour trois ans par l'Assemblée Générale au scrutin secret. Le renouvellement de ces membres a lieu par tiers chaque année. Les membres sortants sont rééligibles.

En cas de vacance, le Comité pourvoit provisoirement au remplacement de ceux de ses membres dont le mandat a pris fin. Il est procédé à leur remplacement définitif à l'Assemblée Générale.

Le Comité directeur choisit parmi ses membres, au scrutin secret, un bureau élu pour un an et comprenant:

un président, un ou deux vice-présidents, un secrétaire général,un secrétaire-trésorier adjoint, deux assesseurs, un conseiller ecclésiastique, si le président n'est pas un écclésiastique.

Le Comité directeur établit le règlement intérieur, le fait approuver par l'Assemblée Générale et en assure les modalités d'application.

**Art 7** Le Comité directeur se réunit au moins trois fois par an, et chaque fois qu'il est convoqué par son président ou sur la demande écrite d'au moins trois de ses membres. Il est tenu un procès-verbal des séances. Les procès verbaux sont signés par le président et le secrétaire général. Tout membres du Comité directeur qui aura manqué sans excuse valable trois séances consécutives pourra être considéré comme démissionnaire et remplacé dans ses fonctions.

Les membres du Comité directeur ne peuvent recevoir aucune rétribution en raison des fonctions qui leur sont confiées.

En cas de necessité, le Président orgnise un vote par correspondance des membres du Comité.

**Art 8** L'association tient chaque année une Assemblée générale convoquée par le Comité Directeur ou sur demande d'au moins un tiers des membres faisant partie de l'Assemblée.

Cette Assemblée Générale comprend :

1°/ Les membres du Comité directeur . 2°/ les membres bienfaiteurs, 3°/ les membres actifs ou leurs délégués nommés par eux.

Son bureau est celui du Comité direcetur, dont les membres ont droit de vote personnel. Les délibérations de l'Assemblée générale ordinaire sont valables quel que soit le nombre des membres présents ou représentés.

Elle entend les rapports sur la gestion du Comité directeur et sur la situation morale et financière de l'association. Elle approuve les comptes de l'exercice clos, délibère sur les questions mises à l'ordre du jour et pourvoit, s'il y a lieu ,au remplacement ou au renouvellement des membres du Comité directeur.

Les membres de l'Assemblée générale sont convoqués par la voie du bulletin de l'association ou par lettre individuelle.

Les dépenses sont ordonnancées par le président qui peut mandater le secrétaire général ou le trésorier à cet effet.

L'association est représentée en justice ou dans les actes de la vie publique par le président . Celui-ci pourra

déléguer tout ou parttie de ses pouvoirs au secrétaire général.

**Art 8 bis** Le comité directeur est habilité à établir un contrat de collaboration réciproque avec toute association poursuivant des buts similaires aux siens . Ce contrat est ensuite ratifié par l'Assemblée générale.

Le Comité directeur habilite l'un de ses membres à participer aux réunions du Comité des associations avec lesquelles il a pris accord et accepte à ses propres réunions un représentant desdites associations.

TITRE III RESSOURCES et MODIFICATIONS

**Art 9** Les ressources de l'association sont fournies par les cotisations des membres et les subventions des collectivitées publiques (l'Etat,départements, communes.) Il est tenu une comptabilité par recettes et dépenses.

**Art 10** Les statuts ne peuvent être modifiés que par une Assemblée Générale extraordinaire, sur proposition du Comité directeur ou de la moitié des membres de l'Assemblée générale.

Pour que les délibérations de l'Assemblée générale extraordinaire soient valables, les votes doivent représenter les 2/3 des suffrages valablement exprimés.

**Art 11** Une Assemblée générale extraordinaire , appelée à se prononcer sur la dissolution de l'Association, peut avoir lieu dans les mêmes conditions que celles précisés par l'art.10 des présents statut .

**Art 12** En cas de dissolution, l'actif est attribué à une association reconnue d'utilité publique répondant à des buts analogues à ceux de l'association. (Fin)

# KALENDARO

**2003**

21/01 — PARIZO
Komitatkunveno de nia asocio
ĉe Konvento S-ta Jakobo 14.00h

27/02 ĝis 02/03 — STRASBOURG
Seminario pri la libro "ADORU"
informoj ĉe:
Adolf.Burkhardt@t-online.com

Augusto — SEBRANICE (Ĉehio) apud Litomys
IKUE E-Tendaro.
En tendara frateca kaj amikeca etoso
Detalaj informoj kaj aliĝiloj estas
haveblaj ĉe : IKUE-Katolika Sekcio
Trsicka ul.6 CZ-751 27 PENCICE .

26/07 ĝis 02/08 — GOTEBORG (Svedio)
88-a Universala Kongreso
de Esperanto.

30/08 ĝis 06/09 — RIMINI (Italio)
56a IKUE Kongreso
53a KELI Kongreso
6a Junulara Ekumena E° Tendaro
Temo "Vi estos miaj atestantoj,
salo kaj lumo por la mondo

# FAME-premio 2002 al ADORU.

En Aalen (Germanio), la 13-an de oktobro 2002, dum solena mateno, Ulrich Pfeifle, ĉefurbestro de Aalen, kaj d-ro Werner Bormann , prezidanto de FAME-fondaĵo , transdonis la Okan Esperanto-Kulturpremion al la pastroj Adolf Burkhardt (KELI) , Bernhard Eichkorn (IKUE) kaj Albrecht Kronenberger (IKUE) , pro ilia ekumena agado, kies kulmino estis la apero de la libro ADORU. La ĉekon de 3000 eùroj danke akceptis la administranto de la ŝuldoj por la libro, pastro Eichkorn.

Rimarkinde, La FAME-fondaĵo unuafoje distingis ne-neùtralan verkon kaj "nur" per-Esperantan agadon. Inter la antaùaj premiitoj estis ege rara la rekono de io farita en la propra lando de FAME: la pli fruajn premiojn gajnis William Auld, Skotlando, Marjorie Boulton Anglio; Gersi Bays, Brazilo KCE/CDELI, Svislando, Spomenka Stimec ,Kroatio, Heroldo de Esperanto en Bruselo, Ito Kanzi, Japanio, Richard Schulz kaj Bruno Vogelmann kiel solaj germanoj.

La dankon de la premiitoj esprimis pastro Eichkorn, menciante la ĵusan aperon de mini-diskedo OekuRom kiu surhavas i.a midiojn por la melodioj de ADORU apud la tekstoj de la libro kaj la tuta Biblio kun la dua-kanonaj libroj en Esperanto (Londona Biblio) kaj en la germana (Einheitsubersetzung).

En sia prediko, pastoro Adolf Burkhardt memorigis, ke preskaù samhore en Londono en la Metodista Preĝejo en Hinde-strato, okazas Esperanto-Diservo por la 90-jara jubileo de tiu "institucio" : de 90 jaroj, kun solaj interrompoj dum la du mond-militoj, ĉiumonate oni celebras en Londono Esperantlingva Diservon !.

# SKRIBU AL AVO FROSTO, LI RESPONDOS. . . ANKAŬ EN ESPERANTO!

## KOMUNIKAĴO DE LA ESPERANTO-SOCIETO KEBEKIA




MONTREALO, KEBEKIO, KANADO, la 13an de septembro 2002. -

Kristnasko 2002 alvenas kaj kiel ĉiujare, miloj da infanoj el Kanado kaj la tuta mondo skribos al Avo Frosto. Tradicie en Kanado infanoj kiuj skribas al li en la franca, angla aŭ en dudeko da aliaj lingvoj ricevas respondon el la norda poluso. Nove ĉi-jare la geinfanoj, kiuj skribos al Avo Frosto, ricevos respondon en Esperanto.
En 2001, la Esperanto-Societo Kebekia (ESK) traktis kun la Kanada Poŝta Servo sugestante la uzon de Esperanto por komuniki kun la esperant-lingvaj infanoj de la mondo. La Kanada Poŝta Servo jesis al la propono de ESK kaj ekde Kristnasko 2002, Esperanto estos inter la korespondaj lingvoj uzataj de Avo Frosto kaj liaj helpantoj, la volontuloj de la Kanada Poŝta Servo por subteni alfabetigon.
La Esperanto-Societo Kebekia invitas ĉiujn esperantistojn, junaj kaj junkoraj, malkovri tiun kristnaskan tradicion skribi al Avo Frosto. Simple sendu manskribitan leteron al la sekva adreso:
Avo Frosto preferas manskribitajn leterojn, eĉ se skribitaj de etaj manoj kiuj lernas skribi. Ne forgesu klare skribi vian nomon kaj adreson por certigi ricevon de respondo.
Ni ankaŭ invitas la esperantistojn kaj la esperantistajn organizojn tra la mondo varbi pri tio tiel ke la esperantlingvaj infanoj povos skribi al Avo Frosto ĉi jare. Por ricevi pliajn informojn, kontaktu nin je **avofrosto@yahoo.ca**
Normand Fleury Prezidanto Esperanto-Societo Kebekia 6358, rue de Bordeaux, Montrealo, Kebekio, Kanado, H2G 2R8

P. S. Estas la unua Kristnasko kiam Avo Frosto uzos Esperanton kaj ĉar li laboras multe dum tiu jarperiodo, povas esti, ke li iom eraros en la liverado de siaj korespondaĵoj. Ekzemple, li povus erari lingvojn aŭ perdi leterojn. Se bedaŭrinde tio okazus al vi, ne estu tro malgaja rilate lin. Anstataŭe sendu retmesaĝon al **avofrosto@yahoo.ca** kaj la Esperanto-Societo Kebekia transdonos viajn komentojn al la Kanada Poŝta Servo. Ni bonvenigas ankaŭ aliajn komentojn. Feliĉan Kristnaskon! Ho! Ho! Ho!





*Jen la adreso de Avo Frosto*

## SACERDOTO CYRIL VRBÍK, IKUE-ANO, MARTIRO DE LA NUNA TEMPO




Marde matene, la 22-an de oktobro 2002, ekaperis malĝoja sciigo: Paroĥestro Cirilo Vrbík el Dub nad Moravou murdita! La sciigo ŝokis ĉiujn, kiuj konis la pastron Cirilon, ĝisfine longjaran IKUE-anon. Dum julia pilgrimo de la kongresanoj al Sankta Hostýn, ankaŭ li tie kuncelebris la Sanktan Meson (vidu DB n-ro 3, paĝo 88 - dua de maldekstre). Post la kongreso en la paroĥejo de Dub li gastigis internacian unusemajnan renkonton, aranĝitan de IKUEJ (vidu DB n-ro 3, paĝoj 93-94). Neniu supozis, ke tiu ĉi renkonto en Dub estas lasta renkontiĝo kun vivanta pastro Cirilo.



*Loko de murda ago*

La murdisto lasis sin veturigi per taksio. Dumvoje li batis la taksiŝoforon, sian konatulon, per botelo kaj vunditan metis lin sur malantaŭan sidlokon, intencante lin iuloke murdi. La vundita ŝoforo sukcesis elaŭtiĝi, kaj kurante sur la ŝoseo li strebis sin savi. La murdisto intencis lin peraŭtomobile faligi, sed li sukcesis sin kaŝi malantaŭ la betonan kolonon. Tial la murdisto daŭrigis veturon en direkto al Dub, kie la aŭtomobilo difektiĝis. Kiam li ekvidis iluminitan pilgrimpreĝejon en Dub, li decidiĝis murdi la paroĥestron. Li eksonoris ĉe la pordo de la paroĥejo kaj petis la paroĥestron priflegi sian brakon, vunditan dum la atako je taksiŝoforo. Li bategis kolon de la pastro, kaj faliginte lin surteren, li tranĉis lian kolon per tranĉilo. Poste li traserĉis la paroĥejon kaj ĉe foriro li ekvidis hakilon, kiun li ankoraŭ enpuŝis en la kapon de sia murdviktimo. Poste li trankvile alvokis taksion kaj forveturis al Přerov, kie li sin denuncis ĉe polico. La murdisto, ekssoldulo de eksterlanda legio, estas ano de satanisma sekto. Li estis jam kelkfoje punita pro perfortaj agoj, ankaŭ pro atako kontraŭ pastro en Kralice.



La entombigo de nia frato IKUE-ano, la martiro Cirilo, okazis en Dub la 29-an de oktobro. Ĉefcelebranto estis Ĉefepiskopo Jan Graubner, kuncelebris Episkopo Josef Hrdlička kaj pli ol cent sacerdotoj. Ĉeestis granda amaso da homoj. Laŭ vortoj de la Ĉefepiskopo, la pastro Cirilo estas martiro de la nuna tempo. Post 33-jara sacerdoteco li postsekvis Kriston ĝis Kalvario, ankaŭ murdita, kiel Li.

**Nia karega martiro, pastro Cirilo, propetu ankaŭ por ni, esperantistoj, ĉe Dia trono!**

EL "DIO BENU" CZ.



# La Asocio Bezonas VIN

**En 2003 kaj 2004 vakos postenoj en nia Komitato . Ni do bezonas kandidatojn, por ĝi .**

**Eĉ se vi loĝas malproksime, eĉ se vi ne perfekte regas la lingvon, eĉ se vi ne havas multe da tempo, vi povas esti utila .**

**Do ne hezitu ! Sendu tuj vian kandidatecon al la prezidanto aŭ al la sekretariino.**

**Ni vere bezonas vin.**

## Kotiztabelo 2003

<u>I.K.U.E kun "Espero Katolika"</u> 25 eùroj

Peranto : S-ro PONS Roger
Rue du 8 Mai 1945
87510 NIEUL.

al kiu vi sendos ĉekon <u>je la nomo de S-ro Pons</u>

<u>A.C.F.E kun "Franca Katolika Esperantisto"</u>

unuopulo : 10 eùroj
geedza paro : 13 eùroj
gejunuloj ĝis 25jara, pastro,religiu(in)o : 5 eùroj
bonfaranto : 30 eùroj

Pagu al la kasisto :S-ro VILLENEUVE G.
14,Clair de Lune
91530 SAINT-CHERON

al kiu vi sendos ĉekon <u>je la nomo de Association Catholique Française pour l'esperanto</u>

Dépot légal : 3eme trimestre 2002 C.P.P.A.P : N° 62532
Imprimé par : A.C.F.E à 9,Rue Paul Doumer 68920 WINTZENHEIM
Enregistrée le : 14 Juin 1996 à la Préfecture de Police de Paris
sous le n° 026831 ; Journal Officiel du 03/07/1996
Directeur : Albert BESSIERE Directeur délégué: Michel BASSO